

Numero: 229.
Junio 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbel@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Somera momento

Por mi somero ĉiam estas tre kara. Ĝenerale en la someraj monatoj mi kutimis partopreni diversajn Esperanto-aranĝojn, kongresojn, aŭ viziti miajn eksterlandajn esperantistajn geamikojn.

Do, laŭ mi la somero estas vera Esperanto sezono.

Mi pensas, ankaŭ aliaj geesperantistoj vidas same.

Kompreneble ankaŭ en aliaj sezonoj okazas valoraj kaj interesaj Esperanto-aranĝoj, sed tamen la somero havas sorĉon.

Eble la longaj tagoj, la sunbrilo, la gaja pepado de la birdoj. Vere mi ne scias la respondon. Somere min ekkaptas ia mistera sento kaj la emo pelas min esperantumi, vojaĝi al nekonataj landoj dume vizitante miajn geamikojn.

Estus bone se la somero daŭrus ĉiam kaj la firmamenton de Esperantujo neniam kovrus nigraj nuboj.

Espereble iam la homaro rekonos la neceson de la internacia lingvo kaj sur nia tergloblo ĉiu lernos ĝin.

Kompreneble oni ne nur lernu la zamenhofan lingvon, sed estus laŭdirinde, se dum la eksterlandaj vojaĝoj oni uzus ĝin kaj ĉiu lando de Tero verdiĝus kaj fariĝus granda, paca familio.

Mi scias, nun ĝi ankoraŭ estas utopio, sed dum la historio de la homaro jam multaj aferoj estis utopioj kiuj fine realiĝis, kaj nun jam ni akceptas tiujn, kiel la nia. Sen ĝi ni ne povas ekzisti. Antaŭ jardekoj aŭ jarcentoj ĝi estis ridinda, kaj oni primokis la eltrovinton. Poste hodiaŭ sen tiu aĵo nia vivo estus pli malriĉa.

Mi tre esperas, en iu tago ankaŭ Esperanto ne estos strangajo, kaj ne nur somere brulos la mondo de geesperantistoj, sed en la tuta sezono.

-Redantanto-



Stultaĵoj pri Esperanto

De sur la interreto mi kolektis la sekvajn „stultaĵojn”, kiujn skribis miaj samlandanoj pri Esperanto.

Plorinde, ke ni hungaroj kiel opinias pri la zamenhofa lingvo.

- Esperanton lerni estas vana afero, ĉar en la mondo neniu parolas ĝin. Ankoraŭ la portugala lingvo estas pli multe parolata en Japanio, ol Esperanto.
- Demando: Kiam estos Esperanto mondlingvo? Respondo: Neniam. Per Esperanto ne eblas esprimi ĉion, kiel per aliaj lingvoj.
- La angla estas mondlingvo Esperanto falis.
- Sciencaj materialoj ne aperas en Esperanto.
- Nenie mi vidis laboranoncon, kie oni petis la scion de Esperanto.
- Kun kiuj mi scias komuniki per Esperanto. Kun neniu.
- Se en Hago vi misvojas, en kiu lingvo vi demandas, kiun direkton iri? Ĉu vi havas ŝancon renkonti tiun ulon, kiu scias Esperanton?
- Se dum negoca pritrakto ĉeestos argentino, usonano, hungaro, polo, turko, kiu estos la laborlingvo?
- Esperanto ne havas praktikan utilon. Ĝi estas nur hobia lingvo, kiel lerni pragreke.
- Esperanton parolas proksimume 1000 personoj en la tuta mondo, tio signifas, ke ankaŭ la albana estas pli utila lingvo.
- Se Esperanto estos disvastiĝinta sur la tuta tergloblo, tiam mi ellernos ĝin. Ĝis tiam mi ne havas tempon por ĝi.
- Mi lernas nur tiajn lingvojn, kiujn mi povas utiligi.
- Mi ne estas malamiko de Esperanto, sed ankaŭ vi, geesperantistoj komprenu, via lingvo estas malutila.
- Esperanto estas facila kaj logika lingvo, sed nenie eblas uzi ĝin.
- Esperanto ŝajne estis bonega ideo, sed bedaŭrinde jam ĝi mortis. Neniu parolas ĝin. Laŭ mi ne lernu Esperanton!

Laŭ mi ni, geesperantistoj devas atenti ankaŭ tiujn ĉi opiniojn pri nia amata lingvo, ĉar se ni preteriras ilin, tiam efektive Esperanto falos.

-Ŝaŝa-

Flaviĝanta letero

Sur la tablo kuŝis ĉifita koverto jam delonge. Ĝi estis ĵetita tien tute hazarde. Inter la libroj kaj kajeroj ĝi apenaŭ estis rimarkebla.

Ŝajne ĝi estis malnova koverto. Sur ĝi la adreso estis malklara. Makulo kovris la nomon kaj la duonon de la adreso. La poŝtmarko malkaŝis, ĉi letero alvenis el iu fremda lando.

En la koverto estis letero skribita per perlaĵ literoj.

En la unua momento vidiĝis, ke ĝin skribis virino. Nur junulino estas kapabla skribi tiel bele.

En la ĉambro estis malhelo. Tra la rulkurteno enpenetris iom da lumo.

Ĉirkaŭ la letero estis diversaj objektoj. La dommastro antaŭ nelonge forlasis la ĉambron. Sur la muro apud la granda lignoŝranko tiktaktis olda murhorloĝo atentigante pri la paso de la tempo.

La tuta domo estis silenta. Certe la domanoj ĉiuj foriris. La ĉambro havis eksterordinaran animagordon kaj la flaviĝanta letero sur la skribotablo radiis melankolion.

Ĉu oni forgesiĝis pri ĝi? Aŭ ĝi estas nur bagatelaĵo. Oni tion ne sciis. La objektoj amare rigardis ĝin en la malhela ejo.

Post longaj minutoj dika libro rimarkis:

-Rigardu ĉi leteron!

Je tio la aliaj objektoj interesiĝante turnis sin al la letero. La dika libro daŭrigis:

-Ĉi tie estas tiu ĉi koverto kun letero. Ni scias pri ĝi nenion. Sinjoro, altestimata letero, bonvolu prezentiĝi! Diru ion pri vi! Ni estas scivolaj ekscii, kiu vi estas?



En la ĉifonita koverto la letero ekĝemis malgaje:

-Ho, paroli pri mia vivo estas tre malfacila!

-Mi petas, tamen provu diri kelke da frazoj! – petis la plumo lasita sur gazeto.

-Bone – konsentis la letero en la ĉifonita koverto

– Okazis antaŭ multaj jaroj, eĉ jardekoj.

-Tiom antaŭ longe? – ekriblis iu en la ĉambro.

-Silentu! – diris la aliaj – Ni deziras aŭskulti la rakonton.

La flaviĝanta letero daŭrigis.

-Vivis junulo en fora lando kaj li ekkonis ĉarmulinon. Ili ekamis unu la alian. Dum la tuta somero ili revadis pri sia estonto promenante sur la riverbordo. Tiuj tagoj, semajnoj estis belegaj. Ili sentis sin en la ĉielo.

Tagoj rapide pasis. La junulo devis forvojaĝi. Antaŭ la forvojaĝo ili promesis unu al la alia, ke ili ĉiam pensos pri tiuj ĉi belegaj tagoj.

Ili pensis, ke la amo estos eterna kaj ĝi neniam ĉesos. Kiam la junulo denove revenos ili geedziĝos.

Ĉirkaŭbrakumante unu la alian ili adiaŭis kaj iliaj ardaĵ kisesoj fandigis ankaŭ la aeron.

La knabino larmokule kuris apud la trajno kaj plore demandis de sia amanto:

-Kiam vi revenos? Mi ĉiam atendos vin. Ne pasos tago, ke mi ne pensos pri vi.

La junulo ne aŭdis ŝin pro la granda bruado de la radoj de la trajno. Li nur mansignadis tra la fenestro, ke baldaŭ li revenos.

La trajno malaperis en la vesperiĝanta pejzaĝo kaj la knabino restis sola sur la perono de la stacidomo.

Kuregis la lokomotivo tirante la vagonojn, kun en ĝi sidanta malgaja junulo. Dum la tuta vojaĝo li nur pensis pri sia karulino, de kiu li devis disiĝi. Li tre esperis, ke post kelkaj monatoj ili denove renkontiĝos, kaj tiam ilia amo plenumiĝos.

Ili skribis leteron preskaŭ en ĉiu tago. Tiuj leteroj temis pri sincera, arda amo.

Sed en iu tago ne venis respondo de la knabino. Li vane atendis ĝin. Li plurfoje skribis al ŝi, sed respondo ne alvenis. Tio ege ektimigis lin, ĉar li ne povis imagi kio okazis.

Jam pli ol duonjaro ili forestis unu de la alia. Ekde semajnoj li sciis nenion pri ŝi.

La junulo ploris ĉiutage, ĉar li antaŭsentis malbonon. Li sentis, ke la knabino forlasis lin. Vane li preĝis, sed letero ne alvenis.

Li jam preskaŭ freneziĝis, kiam la leterportisto frapetis sur la pordo. Li transdonis al la junulo leteron, kiu nun estas antaŭ vi. Li nerveze malfermis ĝin kaj avide li komencis legi.

Jes, la knabino forlasis lin. Ŝi edziniĝis al alia junulo. La geedza ceremonio nelonge okazis.

Mondo renversiĝis en lia animo. Unue li volis memmortigi sin, ĉar kial vivi sen ŝi.

Ofte li legis la leteron kaj ĉiam li kunportis. Tagojn li ploregis pro la knabino, sed la larmoj ne helpis.

Li ne forĵetis la leteron, eĉ li metis ĝin sur la skribotablon, kaj ankoraŭ nun li ofte finlegas la malgajajn frazojn. Tio estas mia historio. Nun jam vi scias – diris la letero kaj denove laŭte ekĝemis – Mi konas ĉi knabinon, ja ŝi skribis min. Efektive ŝi amis la junulon, sed tamen ŝi edziniĝis al alia viro. Ĉu vi komprenas la virinojn?

La objektoj de la ĉambro nur ĝemadis kaj ili ĉiuj kompatis la maljunulon, kiu ĉiutage altabliĝis kaj skribis kaj skribis belajn rakontojn dume ĵetante malgajan rigardon al la flaviĝanta letero.

-Apáti Kovács Béla-

Poezio

Ivan Naumov

Enlitiĝo de jaraĝa knabo

Panjo senlumigis mondon,
Paĉjo murdis muzikilon –
Oni iras vin dormigi,
Oni iras vin dormigi!
Vi surpote nudgenue
Gapas alten kie nube
Vagas kapoj de dormistoj.
Lasta lampo ĵetas rondon
Da palflavo en angulon...
Viaj bestoj iĝis nigro,
Viaj bestoj iĝis nigro!
Nek Hometo sur pikilon
Apoganta, nek Ortigro
Nek Skarabo nek Leporo
Preterglitis nokto-venon,
Kiu ĉiam vokas frue
Laŭ eterne longaj listoj
De dormontoj de songontoj –
Ĉu belreve ĉu inkube –
Ja plenplenas je hororo
Pont' necesa por traligi
La vesperon en matenon...
Nokto brulas per centmiloj
Per milcentoj vitropecaj
Da brileroj nome steloj.
Ili konas ĉiun ulon
Ne vizaĝe – ĝi maklaras,
Ne laŭvoĉe – voĉo dronas,
Ne laŭ ajnaj tiaspecaj
Konigiloj. Ili konas
Vin laŭ songoj kiuj baras
La animon dis senfundo...
Paĉjo, Panj'! Terura hundo
Bojas en obskur' surstrata,
Mi ne volas iri liten!
Mi ne volas iri liten!!!
Ja al lito celas ĉio! –
Nokt' – etendas sian brilon,
Ombroj – rampas kobitide,
Vestoj – sendas la susuron.
Kaj ne kantu pri Songiĝo! –
Mondo mem eknas miten
Kie bestoj estas bestoj,
Kie lumo estas savo,
Kie krio estus helpo,
Kie krio estas fata...

Ne, ne metu min – sub muron
Kiu altas kiel montoj,
Post la kradon, al Kuseno
Kiu tenos min perfide
Ek sen voĉo ek sen jelpo
Ek sen movoj ek sen gestoj,
Sen ajnpovo – ĝis mateno.
Kie estas mia Drako?
Li min savas – nur tenante
Mian Drakon en apudo
Pretas mi al nokta ludo...
Jen, li venis – denta klako,
Ŝelsonoro, flama spiro,
Du flugiloj – tegaj veloj,
Ĉiu ungo estas glavo,
Ĉiu movo estas miro.
Ni en kun' ekiras lante,
Kaj nenio gravas por mi,
Ek – al for' posthorizonta,
Al mateno ĉerizonta...
Panjo, Paĉj'! Mi volas dormi.

06.02.1995



Vespere de Eska

Jam subiris hela suno,
Nokt' arbaron ĉirkaŭpremas,
De la vento arboj tremas --
Lumigitaj per la luno.
Plendas mia juna kor'
Pro sopiro kaj dolor'.
Jen arbaro forte bruas,
Lun' kaŝiĝis en nebuloj
Kaj foliojn de betuloj
Sibla vento forte skuas.
Pro sopiro kaj dolor'
Plendas mia juna kor'.



Por infanoj

Onklo Adalberto

Blanka floreto

Trans la Fabeloceano sur granda verda kampo vivis blanka floreto. Dum la tuta tago ĝi dancis kun la milda venteto.

Feliĉe ĝi pasigis la tagojn, kaj ĝi ne pensis pri la morgaŭo. La floreto pensis, ke ĝi ĉiam vivos tiel bone, kaj la somero neniam forpasos.

Ĝi estis fiera je sia belega blanka vesto. Neniu havis tiel admirindan, kiel la ŝia. Al ĉiu ĝi montris kaj scivole demandis:

-Ĉu mia belega, blanka vesto plaĉas al vi?

Ĉiu demandito laŭdis ĝin kaj flateme diris:

-Neniu havas tiel belegan veston, kiel la via. Vi estas la plej bela sur la tuta kampo.

Tio ĝojigis la blankan floron kaj feliĉe dancis plu.

En iu tago malgranda kokcino haltis antaŭ ĝi.

-Kion vi deziras? – demandis la blanka floreto – Kial vi rigardas min?

La kokcino ekridetis kaj diris:

-Floreto, ĉu vi scias, ke mia vesto estas pli bela ol la via?

Tiu ĉi demando tre surprizis la blankan floron.

-Tio ne eblas – ĝi respondis – Sciu, mia vesto estas la plej bela sur la tuta terglobo. Neniu havas tiel belegan, kiel la mia. Rigardu, kiel brilas mia blanka vesto!

-Venos tempesto kun pluvego kaj via vesto malpurigos. Vi povos kaŝiĝi nenien. Sed mi serĉas ŝirmejon, kaj mia punkteta vesto saviĝos, kaj ĝi ĉiam restos pura kaj eleganta.

Tio tre koleregis la blankan floron, kaj insultigante ĝi montris sian dorson al la kokcino.

-Mia vesto neniam malpurigos – ĝi diris kolere.

-Bone, sed ne forgesu, kion mi diris!

La kokcino forflugis, kaj ĝi lasis tie la blankan floron, kiu denove komencis danci kun la gajaj sunradioj.

La posttagmezo pasis gaje. La blanka floreto estis tre feliĉa. Ĝi tute forgesiĝis, kion la kokcino diris al ĝi.

Apenaŭ komenciĝis vesperiĝi, kiam sur la firmamento nigraj nuboj kolektiĝis. Unue ĝin ili ne interesis, ĉar ĝi pensis, ke nur la subiranta suno malaperis malantaŭ la montopintoj, tial estas malhelo. Sed kiam ankaŭ la vento plivigliĝis kaj la ventego ektordadis la proksimajn arbojn kaj arbustojn, la blanka floreto tre ektimis.

Kien iri por ke la bela, blanka vesto ne malpurigu?

La floroj ne povas iri. Ili devas resti tie, kie ili naskiĝis.

Tio tre malgajigis ĝin kaj laŭte ekploris:

-Help! Helpu min! Mi ne deziras malpurigi mian belan veston.

Pro la tempesto ĉiu forkuris kaj serĉis ŝirmejon. Nur ĝi staris sola sur la vasta kampo.

Estis tiom granda tempesto, ke ankoraŭ oni eĉ ne vidis tian. Ankaŭ ekpluvis kaj grandaj akvogutoj falis el la nigraj nubegoj.

La malfeliĉan blankan floron neniu defendis de la tempesto. Post kelkaj minutoj ĝia vesto estos ĉifonita kaj malpura. Morgaŭ jam neniu admiros ŝian belecon.

Ĝi ege ploris kaj amaris.

Tiam neatendite tia afero okazis, pri kio ĝi ne kuraĝis pensi. En la malproksimo ekaperis kokcino portante gigantan folion. La blanka floreto ne komprenis, kiel povas porti ĝin tiu ĉi malgranda kokcino.

Verdire ĝi apenaŭ povis teni la grandan folion kaj la ventego plurfoje eltordis el siaj manetoj, sed ĝi ĉiufoje ekleviis, kaj rapidis kun la folio al la blanka floreto.

Post longa penado la kokcino atingis ĝin kaj per la folio ĝi ŝirmis la plorantan malfeliĉulon, kiu apenaŭ povis dankegi la helpon. Ili ambaŭ kaŝiĝis sub la folion kaj tie ili atendis la finon de la tempesto.

La vesto de la blanka floreto saviĝis de la malpurigo kaj alitage same bele pompis, kiel antaŭe kaj ĝi feliĉe kriegis:

-Rigardu, kiel belega estas mia vesto!

Kiam ĝi jam sufiĉe ĝojegis, la blanka floreto ĵetis rigardon al la kokcino.

Ho, tiam ĝi rimarkis, ke ĝia malgranda amiko tremante staris apud ĝi. Ĝia vesto estis frakasita kaj malpura.

-Kio okazis al vi? – demandis la blanka floreto – Kiel aspektas via vesto?

La kokcino malgaje rigardis per siaj okuletoj kaj diris nenion. Fine ĝi elbuŝigis:

-Ne gravas mia vesto. Mi ĝojas, ke la via saviĝis, Mi sincere ĝojas al via saviĝo.




La blanka floreto ekhontis kaj mallaŭte diris:

-Mi dankas vian helpon kaj oferton.

De tiu ĉi tago la blanka floreto kaj kokcino fariĝis bonaj amikoj. Dum la tuta somero ili kune ĝuis la karajn sunradiojn.



Iluzio



Iluzio

